PILO-PRESS
Internacia
Informservo
N-ro 29/1974 15 aûg 1974
Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi ŝatas bervalaĵojn?
Aĉetu kaj legu la novan
libron el Bervalio:
"El la vivo de
bervala sen-
taûgulo" de
Louis Beaucaire
Prezo 9,- DM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## La rezolucioj de la 59a Universala Kongreso de Esperanto

1 La 59a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Hamburgo de la 27a de julio ĝis la 3a de aûgusto 1974, diskutis la ĉeftemon "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la hodiaûa mondo",
konstatas, ke nun tre plifortiĝanta potenco de unuopaj ŝtatoj povas malfavore influi la gravan rolon de la internaciaj institucioj, kiuj estas nepre necesaj por la plua evoluo de la mondo en la spirito de la internacia kunlaboro,
substrekas, ke unu el la kaûzoj por tiu tendenco estas la ankoraû nesufiĉa subteno de internaciaj institucioj flanke de vastaj popolamasoj, kiuj bezonas por siaj ĉiam pli intensiĝantaj rilatoj facilan rimedon de interkompreniĝo, kiu prezentiĝas en la Internacia Lingvo Esperanto,
sekve atentigas pri la utilo, kiun donus al internacia kunlaboro la apliko de Esperanto kiel solvo de internaciaj lingvaj problemoj.

2 La 59a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Hamburgo de la 27a de julio ĝis la 3a de aûgusto 1974, kun 1 650 partoprenantoj el 50 landoj,
notinte, ke Unuiĝintaj Nacioj decidis organizi vastan dekjaran agadon kun la celo elradikigi rasismon kaj ĉiujn formojn de rasa diskriminacio,
konstatante ankoraûfoje, ke la respekto por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas baza kondiĉo por la plua progreso de la Internacia Lingvo,
opiniante, ke la lingvaj obstakloj estas unu el la aspektoj de rasaj antaûjuĝoj kaj ke la lingva diskriminacio estas unu el la ĉefaj formoj de kultura diskriminacio,
esprimas sian plenan apogon al la planitaj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la Jardeko de Aktivado por Kontraûbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion,
bonvenigas la specialan laborplanon de Universala Esperanto-Asocio por la Jardeko,
aliĝas al ĝiaj instigoj al la registaroj aliĝi, ratifi kaj realigi la principojn de la Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio kaj aliaj konvencioj en la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj
alvokas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn al mondskala kunlaboro por efika plenumo de tiu laborplano de UEA.

3 La 59a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Hamburgo, FRG, de la 27a de julio ĝis la 3a de aûgusto 1974, pritraktante la ĉefan temon de la Kongreso, nome"Naciismo kaj Internacia Kunlaboro en la Nuntempa Mondo", kaj ellaborante la agadon de Universala Esperanto-Asocio por la tuj venontaj jaroj,
konstatas, ke nur per unueca, celkonscia laboro la Asocio prosperos,
apelacias al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kaj ĉiuj unuopaj membroj, realigi la diversflankan agadon tuŝitan en la Tria Laborplano de UEA, akceptita en Beograd, 1973, kaj plue
emfazas, ke la principo de aktiva neûtraleco, tia, kia ĝi estis praktikata en la laboro de UEA en la lastaj jaroj, estas la sola ebla vojo por la prosperigo de la Asocio, grava unuiga forto por ĝia laboro, kaj plej bona kondiĉo por efika kaj harmonia internacia kunlaboro en la kadro de la Asocio.

## Gvidrezolucio de la SAT-kongreso 1974

La 47a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), okazinta en Bergamo, Italio, de la 3a ĝis la 9a de aŭgusto 1974, kiu kunigis 330 partoprenantojn el 21 landoj, post diskuto kaj aprobo de la Raportoj
-instigas siajn membrojn grandskale informi en siaj propraj organizoj fakaj, kulturaj aŭ politikaj pri Esperanto kiel ilo por universala interkompreniĝo de la laboristaro;
-konstatas kun intereso, ke okazis dum la Kongreso debatoj kun italaj reprezentantoj de la sindikatoj, kaj vokas la membrojn al pli oftaj rilatoj kun la laboristaj organizaĵoj;
-vokas la socialistojn ĉiulandajn subteni la agadon de la Itala Socialdemokrata Partio, kiu daŭre klopodas akceptigi Esperanton en la rilatoj de la Socialista Internacio;
-notas kun kontento la falon de la diktatoraj reĝimoj en Portugalio kaj Grekio, kio malfermas la eblecon al SAT libere disvolvi sian aktivecon en tiuj landoj;
-sekve de la ĵus okazinta abomena atenco de la faŝistoj en la kongreslando esprimas sian indignon per publika protesto;
-bedaŭras, ke multaj membroj ne povas libere partopreni nian Kongreson;
-subtenas la aktivecon de la Laboristaj Esperanto-Asocioj kaj gratulas la SAT-Junularon pro ĝiaj kontentigaj rezultoj kaj ĝia konstanta agemo, same kiel la zorganton de la LJP-broŝurservo;
-admonas la membraron, ke necesas daŭre plenumi la asociajn taskojn malgraŭ la malfavoraj ekonomiaj cirkonstancoj.

*************

Pri la SAT-kongreso raportis Radio Roma en la kadro de sia "Kuriero de Esperanto", dimanĉe, la 11an de aŭgusto, tre detale.

************

## Fervojistoj en la 59a UK

Hamburgo (pp) Dum la kongresa semajno funkciis giĉeto de la Federacia Fervojo prizorgita de fervojistoj-esperantistoj sub gvido de Joachim Gießner. Tiu giĉeto estis ĉiam celo de multaj kongresanoj, kiuj petis informojn, aĉetis biletojn kaj mendis sidlokojn. Detala raporto aperos en Germana Esperanto-Revuo N-ro 5/74 kun foto.
En la kadro de la kongreso okazis "Fervojista Tago", kiu kunvenigis 80 fervojistojn en salono de la Fervoja Direkcio de Hamburgo.
Oni montris ankaŭ kolorfilmon pri la IFEF-kongreso en Tarragona, kiun pretigis Wilhelm Barnickel, Frankfurto.

****************

## La nova UEA-estraro kunsidis

Rotterdamo/Hamburgo (pp) El telefona interparolo kun D-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, ni eksciis, ke la nova estraro de UEA sub gvido de ĝia prezidanto, D-ro Humphrey Tonkin, kunsidis dum 15 horoj la 10an de aŭgusto 1974 en la Centra Oficejo en Rotterdam. La ĉefa laborpunkto estis la ekvilibrigo de la asocia buĝeto por 1974, kiun oni atingis per ŝparoj ĉe oficistaj salajroj kaj la jarlibro, kiu estonte denove nur aperos en 1 volumo. Dum la kunsido oni ankaŭ traktis la demandojn de "komisionoj", laŭ kiuj la estraro intencas labori. Ili konsistas el komitatanoj, spertaj esperantistoj kaj 1 estrarano.

## 151 artikoloj

Hamburgo (pp).Laŭ informo de LKK oni registris jam 151 artikolojn en germanaj gazetoj kaj revuoj pri la 59a UK.

Sukcesa postkongreso en Kronach

Kronach (pp) Plena sukceso fariĝis la postkongreso en Kronach, kiun partoprenis 135 personoj el 19 landoj, inter ili 68 sinjorinoj kaj 67 sinjoroj.
La kontenton kaj ĝojon de la postkongresanoj kaj la gajan agordon observanto povis konstati dum la folklora vespero kun muziko kaj danco. Tiu vespero fariĝis ovacio por la organizantoj de la postkongreso: Stadtamtmann Helmut Goller, la estro de la turisma oficejo de Kronach, kaj Ludwig Robel, delegito de UEA kaj estro dela Esperanto-Rondo Kronach. Samajn meritojn pri la bona trapaso de la aranĝo havas s-inoj Edith Robel, Elke Grötzner kaj la s-roj Armin Grötzner, Walther F. J. Walther kaj Alfred Wollbacher, kaj certe ankaŭ kelkiuj aliaj. Surprizo por la partoprenantoj fariĝis la tombolo, por kiu komercistoj kaj privatuloj de Kronach donacis valorajn objektojn. Ĉiu kongresano ricevis aŭ gajnis premion; la plej valora sendube estis radioricevilo portebla.

Pri la postkongreso aperos detala raporto en Germana Esperanto-Revuo, n-ro 6/74. Ĉi-sube ni publikigas la memorigan foton antaŭ la urbodoma puto en Kronach. Cetere la loka gazetaro tre diligente raportis pri la postkongreso kun multaj fotoj.



Grava ŝanĝo ĉe Esperanto-elsendoj el Varsovio

Varsovio.(pp) La Esperanto-mondo nun denove estas en ordo, por multaj aŭskultantoj de Pola Radio. Ekde dimanĉe, la 18an de aŭgusto, la Esperanto-Ekspreso estos aŭdebla denove posttagmeze, je la 16,30 h (malpli ampleksa versio). La plenampleksa versio aŭdebliĝas kiel nun vespere, je la 22,30 horo. Lunde matene la Esperanto-Ekspreso ne plu estas disaŭdigata, anstataŭe oni aŭdos polajn temojn kaj la rubrikon "El la paĝoj de soci-kulturaj revuoj".

Invito al Pollando

Hamburgo/Varsovio (pp) Laŭ invito de Pola Esperanto-Asocio, D-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA, kaj lia edzino, Elsbeth, vojaĝos la 31an de aŭgusto al Pollando. Dum tri tagoj ili restados en Varsovio, kie ili renkontos funkciulojn de PEA, kaj poste ili partoprenos la 10an Internacian Esperantistan Feriadon "La Ora Pola Aŭtuno" en Miedzygórze.

Pilo-Press, internacia informservo, ĉiusemajna, jarabono 30,- DM
Pagu al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113, PSchK
Nürnberg 819 56-851, Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5.606.489

## 30a Internacia Junulara Konferenco en Münster

Münster(pp) De la 3a ĝis 10a de aŭgusto 1974 okazis en Münster la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO, kiun partoprenis 260 personoj el 31 landoj. Malgraŭ ĉiuj lokaj malfacilaĵoj, speciale loĝigaj, la konferenco fariĝis sukcesa - dank' al la senlacigebla laboro de LKK kun gefratoj Brandenburg je la pinto. Eĉ propra aŭtobus-servo funkciis dum la semajno por veturigi la konferencanojn de iliaj loĝlokoj dissemitaj en la tuta urbo al la konferencejo.

La inaŭguro de la konferenco okazis en la kastelo de Münster. Pro evidenta miskompreno mankis la honoraj gastoj, ĉeestis nur la prezidanto de Centra Laborrondo de germanaj junularaj organizoj, Karl Herfurth, kiu surprizis la ĉeestantojn per flua Esperanto-parolado. Montriĝis ke li mem jam lernis en antaŭaj jaroj Esperanton, li pledis por la enkonduko de Esperanto kaj finis sian paroladon per la slogano: "Eŭropanoj lernas Esperanton!"

La inaŭguron ĉeestis ankaŭ la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, kiu alparolis la konferencon per jenaj vortoj:

"Mi troviĝas antaŭ vi sub cirkonstancoj novaj. En pasinteco mi estis dumlonge aktiva membro de TEJO kaj povus esti ja ke mi estas sola veterano de la IJK en Homburg en 1958. Tiu ĉi konferenco ĉi-jare en Münster baraktis kontraŭ amasoj da malfacilaĵoj kaj mi estas pro tio des pli ĝoja ke tiom da junaj homoj, tiom da aktivuloj kaj tiom da saĝaj homoj troviĝas en ĉi tiu urbo en tiu ĉi momento. Mi transdonas al vi speciale la salutojn kaj bondezirojn de UEA kaj de ties estraro. Ŝajnas al mi ke iasence ĝuste en tiu ĉi jaro ni venis al nova vojkruciĝo kiam temas pri la estonteco de Esperanto. Mi vidas ĉi tie en tiu ĉi ĉambro novan generacion de esperantistoj, ĝi estas generacio kiu iusence kun pli klara vido vidas la rilatojn inter la grandaj sociaj problemoj kaj Esperanto mem. Ĝi ankaŭ estas generacio kiu en multaj kazoj komprenas ĝuste la gravecon de forta Esperanto-organizado. Ĝi estas tamen samtempe generacio kiu komprenas ke serioza Esperanto-movado bezonas ankaŭ sian gajecon. Mi aparte gratulas al la nuna LKK, ke ĝi sukcesis eltrovi tiun sorĉan formulon de seriozeco kaj gajeco. Kaj kun tiuj vortoj mi deziras al vi ĉiuj tre fruktodonan semajnon de laboro kaj amuziĝo. Mi aparte apelacias al vi ke ni ĉiuj kune laboru por la estonta prosperigo de nia lingvo kaj por la prosperigo de TEJO kaj UEA. Bonan sukceson al vi ĉiuj!" La paroladon sekvis forta aplaŭdo!

Festparoladon faris prof. D-ro Helmar Frank, konata germana sciencisto, direktoro de la cibernetika instituto de Paderborn, kiu jam kelkfoje elpaŝis favore al Esperanto. Li parolis pri la temo "Lingvopolitiko por Eŭropo". En sia prelego li skizis perspektivojn de Esperanto kaj eĉ prezentis plurajn praktikajn sugestojn.

Komence de sia prelego d-ro Frank diris: "Tiu ĉi 30a Internacia Junulara Konferenco estas por mi la unua kunveno kie mi paroladas aŭ prelegas en la internacia lingvo.."

Dum la konferenco funkciis multaj laborgrupoj.

******************

D-ro J. Kondor pri Esperanto-Elsendoj: "Ĝoje mi informas vin, ke per mia nova radioaparato ITT-Schaub-Lorenz bonege mi povas kapti de nun Varsovion, Vienon, Bernon, eĉ Pekinon (vendrede vespere!), sed Romon lastan tempon nenie mi trovas, je mia granda bedaŭro. En Radio Wien kaj Varsovio mi ofte aŭdas vian nomon, kaj via PILO-press estas gemo de la "Esperanto-ekspreso"."